LEA/G N-ro 11 3./1995

# MAGAZINO

Organo de Libera Esperanto-Asocio / Germanio (LEA/G)
Membro de LEA - Komitato de S.A.T. Paris
Organ des Freien Esperanto-Bundes in Deutschland

1945 Hitler-Germanio rekrutas "lastajn heroojn"



16-jara germana soldato konsternita pro hororo milita

## LEA/G-JARKUNVENO PASKO '95

*En Mittelwihr (Alzaco), urbeto meze inter vinberujoj, kiuj ankoraŭ ne montris uvojn, nek eĉ foliojn, sed kies sukon ni malrapide ĝuadis, okazis la 50-a do jubileo kongreso de SAT-Amikaro en Francio. Kadre ĝi paskan dimanĉon kunvenis LEA/G-anoj. Detaloj en speciala folio!*

*Dank'al modela organizaĵo flanke de l'O.K.K. sub direkto de nelacigeble aktiva Odette Scheidel partoprenantoj trovis plezuron en kongresaj aranĝoj i.a. invitis Leo Vulfovic al SAT-kongreso ~~1996 en Petroburgo per prelegoj kaj lumbildoj,~~ raportis Hans Rodewig pri nuntempa situacio en Germanio kaj okazis lundon matene prezentado de T.A.K.E.-La Domo, kiu promocias Esperanton en la ekonomia medio.*

*Lotumado donis al la partoprenantoj okazon kunigi agrable kaj ĉeesti Alsacan Vesperon, kiun animis folklora grupo. Mardon, lasta kongresa tago, vizito en pitoreska tre bela urbo Kolmar.*

*Germana LEA deziras al la geamikoj en Francio samkutiman okazon de l'51-a Kongreso kaj dankas por la ebleco okazigi jarkunvenon en Mittelwihr.*

*LEA/G-Estraro*

# S.A.T.

HEJMO POR MODERNAJ KAJ PROGRESEMAJ ESPERANTISTOJ

Peranto en Germanio:
Jiři PROSKOVEC
Heimbaustrasse 10
D-44143 Dortmund

## 68-a KONGRESO DE S.A.T.
## Maribor - Slovenio
## 1995-07-15/22

Ĉeftemo : Tolero al minoritatoj

68. SAT-KONGRESO 15.-22.07.1995 MARIBOR

KONTAKTADRESO:
INTER-KULTURO
Kočevar jeva 12
SI-26000 Maribor
(Slovenio)
Tel.: 386.62.221.371

# Revolucio en Francio

***Parizo 1789***

En la palacoj de la reĝo Ludoviko la XVIa kaj en la domegoj de la nobeloj okazas festenoj senfinaj. Belegaj estas la salonegoj, ornamaĵoj, iluminadoj, la vestoj, la juveloj kaj . . . la virinoj. Nokte kaj tage nobelaro diboĉadas, senzorge elspezadas grandajn kapitalojn. Palaj aspektas la vizaĝoj kaj lacaj.

***Parizo: sama dato***

En la stratoj bruas la popolo: la mizero estas terura, malsato kaj malsano regas, malĝojo kaj malkontenteco estas profundaj. Nokte kaj tage la laboristoj suferadas. Palaj aspektas la vizaĝoj kaj minacaj.

***Historia regulo***

Se unu parto de la homaro fariĝas tro riĉa kaj la alia parto tro malriĉa, tiam ribelos la mizeruloj kaj revolucio certe eksplodos! Ve, ve!

***Parizo 1789***

En la stratoj de Parizo popolamasoj vagas, kriantaj kaj kantantaj pri Libereco, Egaleco kaj Frateco! Krioj, malbenoj, ĵuroj estas aŭdataj . . . Subite la parizanoj amase moviĝas en unu direkton: „Al la Bastije *(Bastille)* ! Al la Bastije!" Pasiaj aspektas la vizaĝoj; terura estas la spektaklo; la popolo de Parizo ribelas!

***Francio 1792–1794***


Kriado: „Sur la lanternon! Sur la lanternon!" Sennombraj ĉaroj veturas al la gilotino; falas la kapoj de Ludoviko XVIa, de Mari Antvanet *(Marie Antoinette)* kaj de multaj nobeloj kaj burĝoj! Estas revolucio en la tuta lando! La Terorreĝimo regas! Fremdaj ŝtatoj minacas! Ĥaoso!

***Francio 1793***

De la insulo Korsiko venas juna oficiro: Napoleono Bonaparte li nomiĝas, filo de advokato. Pri grandeco li revas, kaj pri potenco kaj gloro!

***Francio 1794***

Je la 26a de julio Robespier estas senkapigata; la 4an de oktobro Napoleono fariĝas komandanto de Parizo: la pariza popolo estas bridata kaj punata!



Ekokupo al la Bastiljo (1789 14.07.)

***Francio 1799***

Venkinte en multaj bataloj, la „granda generalo" Napoleono revenas en Parizo: Rimarkinte la malforton de la registaro, li eksigas ĝin kaj fariĝas unu el la tri konsuloj, reguloniaj novan ŝtatan regadon.

***La epoko inter la jaroj 1799a kaj 1812a***

La feliĉostelo de Napoleono brilegas! Granda „diktatoro" li fariĝas.

La lokojn de la antaŭa nobelaro okupas la generaloj kaj novbakitaj altranguloj. Grandaj festenoj senfinaj okazas, kapitaloj estas elspezataj, bonegaj vinoj estas trinkataj, multekostaj vestoj, juveloj kaj ornamaĵoj estas portataj de la altranguloj!

Altaj impostoj estas pagataj, multe da mizero kaj doloro estas suferataj, sennombraj servoj estas farataj kaj miloj da vivoj estas perdataj de la popolo!

For estas Egaleco,
Forgesita estas Frateco,
Nenie en la lando ekzistas
Libereco!

***Post la jaro 1812a la stelo de feliĉo paliĝas!***

Venkite kaj kaptite imperiestro Napoleono estas ekzilata.

***Epilogo***

En la jaro 1821a mortis sur la insulo Sankta Heleno:

la iama potenculo, generalo, imperiestro
Napoleono Bonaparte
severe gardata, mallibera, senpova,
sola!

## Laborkostoj

Laborkostoj estas la malneta salajro de la laboristo plus salajro-kromkostoj. En Germanio labordonantoj kalkulas do krom la malneta salajro ankaŭ aliajn kostojn: interalie salajron dum feriottagoj, festotagoj kaj tagoj de malsaneco. Krome kotizopartojn, kiujn pagas la labordonanto al la asekurakaso (kontraŭ malsaneco kaj senlaboreco, invalideco). Oni kalkulas ekstran debeton de 80% relative al la malneta salajro.

En la tielnomataj „landoj kun malaltaj salajro" oni ne kalkulas salajro-kromkostojn. Ankaŭ la malneta salajro tie estas pli malalta ol en Germanio. El tiuj landoj, ĉefe Singapuro, Sudkoreio, Tajvano kaj Hongkongo, devenas jam 10% de la tutmonda eksporto. La laborkostoj por unu horo en tiuj landoj estas kalkulataj (en nacia mono) inter 7.50 DM kaj 9.90 DM (DM - germanaj markoj). Tio estas proksimume 20% de la okcidentgermana nivelo. Interese estas scii, ke laboristoj en la cititaj landoj laboras iom pli multekoste ol en Portugalio, membrolando de Eŭropa Unio. Sen konkurenco estas laborkostoj eñ Ĉinio, kie oni kalkulas 0.70 DM po horo.

*Karlo*

---

*PLIVASTIGA EŬROPO-UNIO*

*Sekve de aliĝo de Aŭstrio, Finnlando k. Svedio pli-grandiĝis la tereno de la Eŭropo-Unio je 37%; la loĝantaro kreskis je ronde 22 milionojn al pli ol 370 milionoj. En unia Eŭropo do vivas ĉa. 43% pli da homoj ol en Usono, kiu estas trifoje pli granda ol unia Eŭropo.*

| lando | tereno en mil. kv.KM | loĝantaro en miloj |
|---|---|---|
| Aŭstrio | 84 | 7 991 |
| Belgio | 31 | 10 085 |
| Danlando | 43 | 5 189 |
| Francio | 544 | 57 327 |
| Finnlando | 338 | 5 066 |
| Germanio | 357 | 81 180 |
| Greklando | 132 | 10 362 |
| Gr.Britanio | 244 | 58 168 |
| Hispanio | 505 | 39 141 |
| Irlando | 69 | 3 561 |
| Italio | 301 | 58 098 |
| Lukcemburgo | 3 | 398 |
| Nederlando | 42 | 15 290 |
| Portugalio | 92 | 9 877 |
| Svedio | 450 | 8 719 |
| **entute** | **3235** | **370 452** |

(Fonto:Eurostat)

Kelkfoje la eventoj parte koincidas. Kiam Karlo montris al mi la koncepton de la suprecitita artikolo, mi ĵus legis citaĵon de Marks/Engels: „La laboristoj havas nenian patrolandon. Oni ne povas de ili preni, kion ili ne havas." Supozeble la iama germana imperiestro Wilhelm II. aŭdis tiun citaĵon kaj li konstruis el la unua frazo la esprimon pri „senpatriaj ulaĉoj", per kio li misfamigis la socialdemokratajn laboristojn. La dua frazo lin ŝajne ne interesis. Ĝis hodiaŭ la dekstruloj ripete babilaĉas volonte pri la „senpatriaj ulaĉoj". Estas ankoraŭ nuntempe kutimo, ke oni citas nur parton de la eldiron, ĉu en gazetoj, ĉu en televido ktp.

Samtempe mi legis en ĵurnalo la sekvan komunikaĵon: Komence de monato Marto 1995 okazis kunveno de la asocio de labordonantoj, kiuj havas malmultajn dungitojn (plej ofte metiaj majstroj). Ili esprimis sian indignon pri la prezidanto de la labordonantoj de la konzernoj, ke li (laŭvorte) ne plu havas rilatojn al la labormerkato kaj li fariĝis reprezentanto de tiuj, kiuj ne kreas suplementajn laborlokojn, sed nur translokigas produktadajn instalaĵojn eksterlanden, ĉefe al la „malmultekostaj" landoj, por havi profiton.

Kiuj nun estas „senpatriaj ulaĉoj"? Ĉu la laboristoj, kiam ili fariĝas senlaboruloj kaj protestas aŭ ĉu la konzernaj estroj, kiam ili translokigas fabrikajn instalaĵojn al aliaj regionoj por ekspluati la tieajn laboristojn malmultekostajn?

**Henriko**

## Redaktora babilado

Mi supozas, ke ĉiam la samaj anoj kunlaboras al via „LEA/G Magazino", diris antaŭ ne longe iu al mi. Ĝis ia grado tio estas vera. Certe ne ĉiu estas kapabla kontribui al la gazeto per skribaĵo, kiu meritas publikigon. Tamen, estimataj gelegantoj, kiuj sentas sin verkokapablaj sendu al mi sian laboraĵon. Ĝi estu laŭeble aktuala ankaŭ en kelkaj monatoj (ĉar nia revuo ne estas ĉiutaga gazeto). La pritaktita temo povas esti ankaŭ iel kleriga, instrua, ekzemple pri natursciencа branĉo, astronomio ktp. Ilustroj (prefere desegnoj) al la artikoloj estas bonvenaj.



La redaktoro laboras diligente

Nia sennacieca, tutmonda legantaro ĝojus.

*Stefano*

*Esperanto-ROK-Asocio eldonis Vinilkosmo-Kompil' Vol.1. Celo estas, prezenti al muzik-interesuloj ROK-muzikon per Esperanto. EUROKKA fondis diskentreprenon, nome Venilkosmo.*

*Mi ricevis muzik-kasedon kaj la peton, aûskulti ĝin kaj kritiki la enhavon. Tamen aĝa homo min interesas jam ek pli ol kvindek jaroj ĵazmuziko. Sed ROK-muziko, ĉu ĝi ne estas nur ion por junuloj? Kaj nun Esperanto-ROK'!*

*Malfide mi ŝovis la kasedon en mian maŝinon, aûskultilojn super orelojn kaj... aûdis muzikon de unua klaso! Esperanto uzantaj muzikistoj kiel ekz. Amzeev, Kajto, Englund, Koenig k.a. prezentis "feston por miaj oreloj", tamen kelkfoje altaj sonoj ne atentis difektan timpanan membranon dekstrorele, milda heredaĵo. "Mano sur koron" mi povas rekomendi la prezentaĵon al junuloj kaj aĝuloj, verkon, kiun subtenis i.a. SAT-junulfako, tejo, TAME-Fondaĵo.*

*Jen la adreso: EUROKKA, Esperanto-ROK-Asocio, FR-31450 Donneville.*

*A.F. Stephan*

---

## AKTIVECOJ EN BERLINO

***Okaze de Berlina Manifestacio de l'unua de majo, organizita de l'Germana Ligo de Sindikatoj, grupo de ses geesperantistoj, plejparte el la Maldekstra Forumo kaj du SAT-membroj, malvolvis grandan tiucele preparitan sloganbendon sur tio tekston: "Comrade! Compañero! Tovariĉ! Verstehst du mich nicht? Den ArbeiterInnen aller Länder eine Sprache - Esperanto" (trad.: Kamaradoj! Ĉu vi ne komprenas min? Al la gelaboristoj de ĉiuj landoj unu lingvo - Esperanto).***

***La grupo samtempe disdonis pri-esperantajn flugfoliojn (600 ekzpl.). La publika festo havis iom kermesan karakteron kaj okazis en Köllnischer Park, kie staris INFO-standoj de sindikatoj kaj de maldekstraj organizaĵoj.***

*Gary Mickle*

(Rim.de Redakcio: Ni ricevis ekzempleron de bonstilan varbtaûgan flugfolion!)

La urbo Tampere en Finnlando gastigos la 80-an Universalan Kongreson de Esperanto de la 22-a ĝis 29-a de julio 1995. Kiel la Tampereanoj vidas sin mem, pri tio skribis iu J.L. en la revuo „Heroldo de Esperanto" je 26.03.1995 sub la titolo

## Kiaj estas la Tampereanoj

Tampereo apartenas al la historia provinco Häme (en Finnlando), kies loĝantoj estas famaj pro sia silentemo, malrapidemo kaj profunda persistemo.

Kiam oni scias, ke la Finnoj ĝenerale estas ne tre gajaj kaj viglaj homoj, tio ne signifas, ke oni timu veni ĉi tien. Ĉar se ili ĝenerale ŝatas esti en siaj propraj rondoj, tio ne signifas, ke ili ne volas kontakti eksterlandanoj – oni nur devas scii, kiel alproksimiĝi al ili. Kaj tio certe ne koncernas esperantistojn!

Estas malfacile diri, kia estas tipa Tampereano, ĉar en la urbo loĝas tiom da novalvenintoj, ke ĉio ŝanĝiĝis.

Eble la ĝusta karakterizo de tipa Tampereano estas tia: li laboris sian tutan vivon en la sama fabriko/entrepreno, klopodas trovi solvon al siaj problemoj mem kaj nur en la lasta ebla okazo petas helpon. Li ankaŭ scias silenti en aŭtobuso, eĉ se iu klopodas paroligi lin/ŝin. Li fidele uzas sian konatan vojon al la laboro, kvankam li scias, ke troviĝas pli rapidaj. Li ne ŝatas translokiĝi de Tampereo por atingi pli altan salajron, eĉ ne ŝatas translokiĝi de unu flanko de la rivero al la alia.

Lastatempe Tampereo fariĝis pli internacia: unue pro la universatataj studentoj el evolulandoj kaj pro diversaj rifuĝintoj de Vjetnamio, Somalio, laste Estonio kaj Rusio.

Malgraŭ ĉio, Tampereo tamen restas tipa finnlanda urbo.

(J. L.)

P.S.: Rimarkoj de la tajpisto de tiuj linioj:

Jukka – tiel estas la antaŭnomo de J. L. – troigis iom. Mi konas lin. Mia loĝloko Essen estas ĝemelurbo de Tampere kaj mi estas tie ne plu nekonato.

Kiam mi vizitis kun Jukka kaj la aliaj amikoj Veli, Lauri, Pentii ktp. la saŭnon, ni estis tre gajaj. Supozeble tie ili degeliĝis. Ni babilis kaj poste kantis kune (sen alkoholo!).

Aŭ vizitu la „Pirkkahalli" por rigardi glacihokea konkurado. Tiam vi spertos, ĉu la Tampereanoj estas silentema popolo. Tie „ŝanceliĝas la muroj"!

KHK

# Horoskopo

Astrologio estas lanĉire pli aĝa ol 3000 jaroj kaj la ĉinoj estus estintaj la unuoj, kiuj jesis influon de la planetoj sur psiko de l'homoj. Eble jam pli frue homoj havis tiujn percep-tojn. Al ebla demando "Ĉu vere, ĉu ne?" mi ne povus respondi. Ĉar astro-logio ne estas scienco!

Antaŭ preskaŭ 40 jaroj min interesis astrologio. La posedanto de l'domo, en kiu estis mia unua modesta loĝejo post la lasta kruela milito, konvinkis min, ke steloj (planetoj) dirus ion pri la karakteroj de l'homoj. Li eĉ riskis arestadon (tri jarojn), ĉar publiki-ginte per flugfolio, ke Hitler ne atingus altan aĝon; tion li estus vidinta en horoskopo, kiun li faris pri Hitler.

Mi aĉetis librojn kaj tabelojn pri astrologio kaj post intensa studado komencis "fabriki" la unuajn horosko-pojn: la mian, pri miaj fratinoj, pri mia edzino k.a. Mi spertis baldaŭ, ke ne ĉiam la karaktero interkonformas al horoskopo kaj, ke krom zodiaka sig-no de l'naskiĝtago, ankaŭ ascendento (tio estas la sekcopunkto de ekliptiko k. orienta horizonto de l'naskiĝo) el-dirus ion pri la naskito. Tiu punkto preskaŭ ĉiam estas en alia zodiaka signo ol la suno. Tial estas por la karaktera priskribo ĉiam ambaŭ la zodiakaj signoj konsideri. Mi konas fumulinon ties zodiaka signo estas en VIRSAFO kaj la ascendent-punkto en la sama signo. Do, absoluta virŝaf-ino; ŝia karaktero estas tia.

Do, persona horoskopo estas pli eldirforta ol simplaj horoskopoj en gazetoj, revuoj k.a. Ĉar la homara vivo estas diversspeca dum ĉiu tago, eĉ ĉiun horon. Pro tio selme mi pre-zentas nur ĝeneralajn naturojn kaj elektis tiujn kompare al la MAGAZINO-apermonatoj nuntempe julio - septembro.

STELOJ NE DEVIGAS,
ILI INKLINAS TARI JON!

KANKRO



22.6.-22.7.

Oni diras humure: Ĉu kankro? Tri paŝ-ojn antaŭen, du paŝojn malan-taŭen! Estas sunsigno, ĵus la somero komencis. Planeto LUNO regas la sig-non signifas formad-forton. Kankro-naskitoj ŝatas flegatan loĝejon; povas ludi rolon en la societo kaj aliflanke vivi tute sola.
Koloroj: verda, arĝenta, blanka.
Juveloj: smeraldoj, opaloj, lunŝtonoj, arĝento.

LEONO



23.7.-23.8.

Ĝin regas la SUNO; la plej varma monato. Leonnaskitoj estas kreantaj, malavaraj, agemaj, memkonsciaj. La naskitoj sub tiu reĝa simbolo defendu sin de despoteco kaj bridu instinktojn.
Koloroj: oranĝa, ora, flava.
Juveloj: rubenoj, diamantoj, metalo oro, topazo



Knut Hamsun, norvega poeto, naskiĝis la 4-an de aŭgusto sub la zodiaka signo LEONO

VIRGO



24.8.-23.9.

Pri tiu zodiaka signo regas la planeto Merkuro. Virgo-naskito estas atente-ma, laborema, metoda, havanta pacien-con. Malvirtoj povas esti nestabileco kaj dubeco "Ne ĉiu virgo estas virgino!"
Koloroj: viola, helblua, blanko.
Juveloj: ruĝa jaspo, hiacinto, turmalino, topazo



J. Wolfgang von Goethe naskiĝis 28-an de aŭgusto sub la zodiaka signo VIRGO

(Daŭrigota) Ŝtefano

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNAĈIA
SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO LANTI

## LINGVOANGULO SPRACHECKE

1: Esperanto kennt nur drei Aussagen -

a) Wirklichkeitsweise (Indikativ)
b) Bedingung oder Wunsch (Konditional)
c) Befehlsweise (Imperativ)

Man unterscheidet zwei Zustandsformen

a) Tätigkeitsform (Aktivum)
b) Leideform (Passivum)

Die Nominalformen sind -

a) Nennform (Indikativ)
b) Mittelwörter (Partizipien) der Gegenwart und der Vergangenheit

2: Esperanto kennt keine unregelmässigen Zeitwörter (Verben), ebensowenig einen Unterschied zwischen den Beugeformen für Einzahl und Mehrzahl.

3: Die folgenden zwölf (12) Verbalformen genügen zur Bildung der einfachen und der zusammengesetzten Zeiten jedes Zeitwortes:

a) Gegenwart - Endung -as
b) Vergangenheit - Endung -is
c) Zukunft - Endung -os
d) Konditional - Endung -us
e) Befehlsform - Endung -u
f) Nennform - Endung -i
g) Gegenwart des aktiven Mittelwortes Endung -ant iranta - gehend
h) Vergangenheit des aktiven Mittelwortes - Endung -int vokinta - gerufen habend
i) Zukunft des aktiven Mittelwortes Endung -ont ironta - gehen werdend
k) Gegenwart des passiven Mittelwortes - Endung -at vokata gerufen
l) Vergangenheit des passiven Mittelwortes - Endung -it manĝita - gegessen worden
m) Zukunft des passiven Mittelwortes Endung -ot vokota - gerufen werden sollen

Übersetzung der grammatischen Bezeichnungen: indikativo - Wirklichkeitsweise kondicionalo, imperativo, aktivo, pasivo, participo, verbo, singularo - Einzahl, pluralo - Mehrzahl, prezenco - Gegenwart, preterito - Vergangenheit futuro - Zukunft,

(Fortsetzung in MAGAZINO n°12 - okt.'95)

La saĝuloj havas du lingvojn: unu por paroli la veron kaj la duan por paroli laŭ la etoso de la epoko.

***Euripides***

## Ej em hott

### = mi estas varmega

Mi konfesas, ke mia scio pri la angla lingvo estas nesufiĉaj. Sed ĉiutage mi estas konfrontita pli kaj pli kun anglaj esprimoj. Oni vidas ilin sur afiŝkolonoj, en montrofenestroj aŭ sur jakoj kaj ĉemizoj. Kiam mi tradukas laŭvorte, ofte mi ne komprenas la sencon. Ili estas idiotismoj t.e. multsignifo de multaj vortoj kaj frazoj. Ke „go together", per kiu jam delonge varbas iu cigaredofabriko, estas „iru kune" tion mi scias. Sed plej ofte mi devas serĉi helpon pere de vortaro aŭ libroj pri parolturnoj. Tiam mi ekscias, ke la esprimoj ofte estas usona slango. Ĉu ekzemple la portantoj de ĉemizoj scias aŭ komprenas, kion estas skribitaj tie? Kelkfoje mi dubas.

**Jen vera evento:**

Antaŭ nelonge mi renkontis survoje junulinon en aĝo de proksimume 20 jaroj. Ŝi estis ŝvelsvelta kaj vestita per iom tro streta ĉemizo. La figuro de ŝi estis bone reliefigita. Mia sangopremo saltetis alte. Sed kion mi legis, skribita sur la ĉemizo? **I am hot!**



Hot – mi rigardis duan fojon – ĉu vere? Miaj jam iom kadukiĝintaj cerboĉeloj ne plu funkcias rapide.

**I am hot = mi estas varmega.**

Ĉu mi devas kompreni tion metafore? Miaj cerboĉeloj laboris: Hot dog = varmega hundo aŭ bulko kun kolbaseto: hot pants = varmega pantaloneto aŭ iom el la virina modo. Aŭ laŭ vortaro: hot = varmega, akra; en metafora senco = amora, pasia, arda; laŭ vortaro por komputilo-uzantoj = sub tensio, radioaktiva.

Antaŭ ol mi komprenis, la "anĝelo" jam estis for. Mi iris al la proksime situanta drinkejo kaj mendis laŭ la slogano de iu brandofarejo: Pro tiu ektimo – klaran brandon.

*Karlo*



## SKIZE PRI VINO

*'La vino estas la lakto de Afrodita,' konstatis Aristofano. Do, oni trinku ĝin respektoplene kaj danke. La blanka vino devenas el blankaj vinberoj, ankaŭ el ruĝaj blanksukaj kies ruĝaj ŝeloj estas apartigitaj de l'mosto antaŭ fermentado. Roza vino devenas el ruĝoj vinberoj kies ruĝaj ŝeloj estas apartigitaj de l'mosto tuj post ekfermentado. Ce sekaj vinoj fermentas la mosto ĝis la tuta sukero estas transformata en alkoholo.*

*Por atingi dolĉan vinon la mosto fermentas ĝis la dezirata momento per aldono de alkoholo al la mosto kaj konzervas tiamaniere pli aŭ malpli da sukero. Likvorvinoj estas produktataj per aldono de alkoholo al mosto kaj malebligas fermentadon; la vino konservas sian tutan sukeron. Por la prestiĝaj likvoraj vinoj (Sauternes, Monbazillac) vinberoj estas ŝirkolektataj bero post bero.*

*Al ŝaŭmvinoj oni aldonas tutsimple gason aŭ akiras ĉampanon per dua fermentado en boteloj (produktataj nur en Ĉampania areo Reims). Fermentata vino en fermitaj kuvoj estas vino laŭ Ĉampana metodo.*

***Georges Brouel***

## Leteroj de legantoj

Nacia Esperanto-Muzeo de la franca esperantistaro en Gray skribis al ni: . . . Mi petas vian indulgon ĉar mi ne pli frue respondis kaj dankis pri la senditaj dokumentoj koncernantaj vian Liberan Asocion. - . . . Kompreneble mi estus feliĉa, se vi daŭrigus sendi venontajn eldonaĵojn por la muzeo . . .

*Geo. Junier, muzeo-estro 23.03.95*

* * *

Georges Brouel el Catus (Francio) skribis (21.04.95): Al via artikolo „Paño kaj cirkoludoj" (LEA/G MAGAZIÑO n-ro 10): La kampanjo pri elekto de nia prezidento koincidas tre bone kun via artikolo. Ankaŭ hodiaŭ oni kvietigas la popolon fare de senvaloraj promesoj . . .

* * *

*Farsta 1995-03-21*
*Karaj gek-doj!*
*Mi salutas la Jarkunvenon 1995 de Libera Esperanto-Asocio (LEA/G) kaj deziras al ĝi plenan sukceson! Mi legos ankaŭ estontece kun granda intereso: "MAGAZINO"!*
*Vivu la laborista esperantismo!*
*Kamarade salutas Pelle Persson*

* * *

Apernotoj/Impressum
LEA/G-MAGAZINO
Eldonanto/Herausgeber:
LIBERA ESPERANTO-ASOCIO
FREIER ESPERANTO-BUND
Renchener Str.47
D-77704 Oberkirch(Baden)
Resp./verantw.Red.:
Albert STEPHAN - Tel.07802/90336
Konstantaj kunlaborantoj/
ständige Mitarbeiter:
Karl-Heinz KERSTING, Essen
Margot HEKTOR, Oberkirch
Hans RODEWIG, Hannover
Pri l'enhavo de sia artikolo la aŭtoro responsas mem.La redakcio rezervas al si la rajton, mallongigi aŭ rifuzi alsendojn.
MAGAZINO aperas kvarfoje jare/ erscheint 4xjährlich.
Konto: Kersting
Nr. 416210-432 Postbank Essen
(BLZ 360 100 43)
(LEA/G-kotizo entenas liveradon de MAGAZINO)

Mario Guzzi estis la unua esperantisto, kiu respondis 1946 al mia poŝtkarto sendita el militkaptiteco en Egiptio.

Stefano

Marjo Guzzi

### Mi timas la morton!

Infaneco fabela:
tagon post la alia,
ĉio rava, ĉio fea,
ĉio magia.
Dumjuneco sorĉa:
ĉio ĉarma, ĉio pasia;
koro, haŭto - ĉio varma!
... "amo mia!"
Juneco arda:
korpo, menso - simfonio;
ridoj, larmoj - nenio;
ĝojo, ĝuo - malio.
Plenaĝeco profunda:
sento pri ĉio,
pri ni, pri ŝi, pri ili;
familio, venonto - Dio!
Maljuneco milda:
kune, sed - labirinto;
doloroj, regretoj:
nur la pasinto

Kaj jen la fantomo:
la morto;
ĝi venas, ne krias;
ĝi palas, ĝi frafas!

Kie vi estas, vivo mia?

(el: HEROLDO DE ESPERANTO)

### NEKROLOĜO

*En Dortmund mortis la 13.03.1995 en aĝo 86 nia fidela membro kaj amiko*

**Heinrich BELLEN**

*Li estis unu de la geamikoj, kiuj fondis 1956 nian asocion. Menciinda estas sia aktiveco por S.A.T.*

*Ni kondolencas al la edzino Herta, ankaŭ multjara membro de LEAG*

*LEA/G-Estraro*

*Hola, LEA/G-gemembroj, nia kasisto estas tre kontenta, ĉar 94,76% de l' membraro pagis sian kotizon.*
*Amikan dankon! LEA/G povas daŭrigi aktivecojn.*
*La Estraro*

## BROŜUROJ DISPONEBLAJ

| Mend-kodo | Titoloj-aŭtoroj | Prezo en DM |
|---|---|---|
| AA. | La Aperoj de Ahasvero(Riner) | 10,- |
| AP. | Amo per proverboj (Azevedo) | 1,- |
| AT. | Kial mi estas ateisto? | 10,- |
| BP. | Legendo pri la bela Pekopeno (Victor Hugo) | 5,- |
| DI. | Kieldiri...? E-frazeologio | 10,- |
| ES. | Por ekologia socio (Bookchin) | 5,- |
| FA. | Konstrui fajron(J.London) | 2,- |
| FF. | La Forto de la Fortaj(London) | 2,- |
| FZ. | Filozofio Zoologia (Lamark) | 8,- |
| HI. | Historio pri la skismo(SAT) | 2,- |
| JA. | Jaro 2000 (H.Muller) | 11,- |
| KB: | Kie brulas. ĝentlemanoj? (poemaro de Buchowski) | 6,- |
| KI. | El la kara infaneco (Valo) | 6,- |
| LA. | Lingvaj anguloj (Baronnet) | 8,- |
| KO. | Kongreso de Popoloj(mondciv.) | 11,- |
| LL. | Leteroj de Lanti(ĝis 1937) | 15,- |
| LM. | La mondo ne havas atendejon | 6,- |
| LR. | La Ribelo (romano de Roth) | 6,- |
| NA. | Naciec.Problemoj(Luksenburg) | 3,- |
| NO. | Nova Paradigmo en Psikologio | 11,- |
| NT. | Ne tiel, sed tiel ĉi!(Faulh.) | 5,- |
| RK. | Rakontoj I (Kafka) | 5,- |
| TP. | La Turo de l'Popoloj(Riner) (Romano) | 10,- |
| VH. | Ĉu ni vere helpas la trian mondon? (Roberts) | 5,- |
| VT. | El verkoj de Leo Tolstoj | 3,- |
| ZH. | La Zamenhofa Homaranismo | 2,- |
| MAG/1 | Skize pri Esperanto-teatro | 8,- |
| MAG/2 | 8 poŝtkartoj en kovrilo pri kult.historio de Esp.movado | 8,- |
| MAG/3 | "Wir lernen Esperanto" | 16,- |
| MAG/4 | Ilustr.historio de la Laborista Esperanto-movado | 10,- |
| MAG/5 | Resonoj/Nachklänge | 22,- |

La librojn ofertas Broŝurservo de Amika Esperanto-Rondo, Beauville, kaj MAGAZINO. Bv.mendi ĉe LEA/G p.adr. A.F.Stephan, Renchener Str.47, D-77704 Oberkirch. Tie vi povas ricevi kompletan libroliston! Prezoj ĉiam plus ekspedkostoj 1,10/1,50 DM.

---


*LEA/G-anoj kaj SAT-membroj povas mendi Esp-literaturon, lernolibrojn, vortarojn ĉe: Consuelo FÜHRER, Am Stadtpfad 11 DE-65760 Eschborn (kaj/aŭ) Rolf BEAU, Jacobstr.9, DE-04105 Leipzig*

---


*MAGAZINO praktikas per ESPERANTO*

## PRAKTIKA FRANCIO

*Francaj departementoj estas numeritaj de 01 ĝis 94. Tiujn ciferojn vi trovas en la poŝta kodo kaj ankaŭ sur la aŭto-signo. Ekzemple Parizo havas la ciferon 75, SAT-sidejo kodas 75020 (20 signifas la kvartalon) kaj la veturilo de l'SAT-prezidanto montras la finan numeron 75.*




*Nu, jes, eksterlandaj rigardantoj de la supra plano pri departementaj ciferoj certe opinias, ke la aŭtoritatoj asignis la ciferojn preskaŭ kaosa. Ekz. 01 vi trovas sud-oriente, 02 tute norde, 19 en la franca mezo kaj 20 estas la cifero por Korsikio.*




*Bv. pardoni, kamarad(in)o en Francio, mi ne intencas ofendi vin kaj viaj aŭtoritatoj, sed vi eble emos klarigi al MAGAZINO-redakcio la sencon de la "senordo". Respondoj aperos en MAGAZINO n°12 oktobro '95. Sameldone ni informos pri tiu praktiko en Germanio.*

*Ŝtefano*